# Jarraportoj de Esperanto-USA

# 2022

## Preparita por la kongreso en Montrealo, Kanado aŭgusto 6 – aŭgusto 13, 2022

**Esperanto-USA** **tel: 510.653.0998**
**91-J Auburn St #1248**
**Portland MA 04103**

**eusa@esperanto-usa.org**
**www.esperanto-usa.org**

# Table of Contents

**Raporto de la Prezidanto de Esperanto USA....................................................................3**
**Raporto pri la  Centra Oficejo de Esperanto-USA...........................................................8**
**Raporto pri la 52-a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) 2021.....9**
**Raporto pri la Senpaga Perpoŝta Lecionaro 2021.............................................................9**
**Raporto pri la Diskoniga Komitato 2021..........................................................................10**
**Raporto pri la Usona Bona Film-Festivalo......................................................................10**
**Raporto pri la Fonduso Goldman.......................................................................................11**
**FINANCAJ DOKUMENTOJ...................................................................................................11**

# Raporto de la Prezidanto de Esperanto USA

La stato de Esperanto-USA

## Resumo

Esperanto-USA estas aktiva komunumo de Esperantistoj en Usono. En 2021 ni perdis nek monon nek membrojn. Ni spertos ĉeestan landan kontgreson en 2023. La komitatoj kaj lokaj grupoj aktivas, kaj la Usona Bona Filmfestivalo sukcesas dufojojn jare.

## Lokaj Grupoj

Niaj membroj en Usono troviĝas en vaste diversaj lokoj tra la lando. Malmultaj urboj havas Esperanto-klubojn kun multaj membroj, kiuj kutime ĉeestas kunvenojn. La kvanto de membroj, kiuj estas izolitaj aŭ kiuj estas en tre malgranda klubo, estas tro multaj por nur unu gvidanto administri. Tial ni kreis reton de regionaj kunordigantoj. Ni dividis Usonon en dek regionojn, ĉiu kun helpanto. Tiu helpanto (regiona kunordiganto) ludas gravan rolon en la nova komunika infrastrukturo. La regiona kunordiganto en ĉiu grupo nutras la grupojn, helpas novajn membrojn trovi sian grupon, ĝisdatigas la liston de lokaj grupoj en nia retejo kaj provizas fortan ligon inter ĉiu loka grupo kaj la naciaj gvidantoj. Fred Meyer estas la kunordiganto de la Regionaj Kunordigantoj. Danke al Fred, la listo de lokaj grupoj en nia retejo estas pli aktualaj ol en antaŭaj jaroj. Ni scias pli pri la bezonoj de niaj kluboj, kaj tial ni kapablas kompreni kiel Esperanto-USA entute povas doni pli bonan subtenon al niaj lokaj grupoj.
Vi povas vidi nian liston de lokaj grupoj en nia retejo ĉe
https://ttt.esperanto-usa.org/groups

Kompreneble, se vi volas trovi lokan grupon proksime de vi, kontrolu tiun liston. Se vi volas kontakti regionan kunordiganton, vidu la liston sur nia paĝo de kontaktoj ĉe
https://ttt.esperanto-usa.org/eusa/contact/eo
La pli forta subteno por lokaj grupoj kaj la komunika infrastrukturo per la regionaj kunordigantoj donas novan povon kaj esperon al lokaj grupoj, ĉu novaj, malnovaj, grandaj aŭ malgrandaj.

## Financa Stato

Antaŭ kelkaj jaroj, oni rajtis maltrankviliĝi pri la stato de Esperanto-USA, ĉar la organizo en tiu tempo kutime perdis monon jaron post jaro. Nun en 2022 ni spertas etoson en kiu multaj senprofitcelaj organizoj ŝrumpas. Kiel Esperanto-USA statas finance nun?

Ni finis la jaron 2021 kun gajno de $ 3157.95.

Se vi legas niajn jarraporton kaj la bultenon *Usona Esperantisto* vi jam havas ideon pro nia stato.  Sed malgraŭ tio, ni revizitos kelkajn iniciatojn kaj reliefigos kelkajn punktojn, kiujn eble vi ankoraŭ ne konas.  Kelkaj punktoj jam ne estas novaj klopodoj, sed meritas ripetadon pro sia boneco.  Kelkaj iniciatoj daŭre maturiĝas kaj ricevas atenton de la estraro de la koncernaj teamoj.

## Aktiva estraro

Via Estraro kunsidas ĉiumonate anstataŭ ĉiujare jam dum kvin jaroj. Ni ankaŭ renkontiĝas inter la monataj kunsidoj per retpoŝtoj kaj la mesaĝsistemo Slack. Ni preskaŭ ĉiam havas kvorumon ĉeestantan, kaj ĉiam raportas la protokolojn de ĉiu kunsido en nia oficiala komunika organo, *Usona Esperantisto*.

Niaj financaj raportoj aperas kelkfoje tra la jaro anstataŭ nur po unu fojo jare. Ĉi tiuj raportoj nun inkluzivas ankaŭ la statuson de la diversaj fondusoj por ke la administrantoj kaj komitatoj de fonduso povu scii ĝian ĝisdatigitan financan staton. Ĉi tiu financa stato povas ŝanĝiĝi dum la jaro pro investaj spezoj. Pro tio, ke la saldo de mono en la fondusoj estas investita, tiuj enspezoj estas redonitaj al la saldo laŭ proporcia bazo.  Kompreneble, falo de la borso elprenas monon simile de ĉiu fonduso laŭ proporcia bazo.
Via Estraro de Direktoroj laboras por esti pli travidebla kaj fidinda kun la valoraĵoj kaj respondecoj, per kiuj vi konfidis al ni.

La Estraro ĉiam laboras kun la regularoj kiel nia ĉefa gvidilo. Preter tio ni havas Manlibron por la Estraro de Esperanto-USA por helpi nin enŝipigi novajn estraranojn dum ili estas elektitaj kaj komencas plenumi sian mandaton fidele.

## La Usona Bona Film-Festivalo

Danke al Alekso Miller kaj lia teamo, la nun-fama filmfestivalo sukcesas denove en 2022.  Alekso raportas pri tio en aliaj raportoj en *Usona Esperantisto* kaj en nia Jarraporto.

La rezultoj troviĝas en nia retejo ĉe https://ttt.esperanto-usa.org/eusa/film_festival/eo. Tiu paĝo entenas ligojn al ĉiu filmo.  Vi povas spekti kaj ĝui la filmojn de ĉiu festivalon nia oficiala jutuba kanalo .

Kaj dankon al Esperantic Studies Foundation, kiu subtenas la festivalon per finance subvencio, en kiu la mono, kiun vi donacas por tiu celo estas duobligita per ESF ĝis limo de $5000.

## UK2022 en Montrealo

La 107a Universala Kongreso de UEA metas la Esperantan komunumon de Usono pli profunde en la tutmonda movado. Ne ofte aperas la UK en Nord-Ameriko, kaj ni profitas de la aranĝo. Multaj Esperantistoj usonanaj partoprenos kaj ankaŭ helpos gastigi la kongreson.
Pro tio, ke la estraro de Esperanto-USA ne volis ke la membroj en Usono fronti decidon ĉu partopreni la landan kongreson de Esperanto-USA aŭ la Universalan kongreson de UEA, ni decidis okazigi nian 70an landan kongreson dum la UK en Montrealo. Tiel la membroj de usono povas partopreni en ambaŭ kongresoj per unu aranĝo.
Ni uzos kvar programerojn el la horaro kiel sesiojn por EUSA:

1. La kunsido por la estraro de Esperanto-USA
2. La solena malfermo por la LK de EUSA
3. La aferkonsido por EUSA
4. La solena fermo por la LK de EUSA

## Volontuloj

La volontula komitato nun pli aktivas sub la gvidado de Marcus Griep. Ni daŭre serĉas volontulojn por diversaj komitatoj kaj projektoj. Tiu informo troviĝas en aliaj raportoj de ***Usona Esperantisto*** kaj en nia retejo kie vi trovos ĉiun nian bultenon.

## Komitato pri Diskonigo

La progreso pri multflanka propagando de Esperanto en Usono estas evidenta en la nove restarigita komitato pri diskonigo.

## La Goldman Fonduso

La Fonduson de Goldman prizorgas Charlotte Burton. Tra tiu speciala konto fluas la monon de ESF por la sukcesaj filmfestivaloj. Ankaŭ tiu fonduso provizis stipendiojn, pri kiuj Charlotte raportas en Usona Esperantisto kaj en la Jarraporto.

## Komitatano A de Esperanto-USA al UEA

Nia reprezantanto kiel Komitatano A al UEA estas Profesoro Duncan Charters, kiu ankaŭ nun estas la prezidanto de UEA. Dankon al nia amiko Duncan por servi tiel. Ni certe kunlaboros diversflanke kun UEA pro liaj postenoj kaj nia bona rilato.

## Komitato pri Membreco

Estrarano Tim Boronczyk estras la Komitaton pri Membreco. Danke al tiu komitato, nia membrokvanto ĝuis stabilecon tra la pandemio. La komitato zorgas pri akiri membrojn,

prizorgi membrojn tiel ke membroj ne kabeus, kaj reakiri membrojn kiuj permesis ke la membroperiodo pasu sen remembriĝi.  La pli bona komunikado frunktodonis, kaj ni nun frontas la estontecon kun kresko de membrokvanto.

## Fakgrupoj

Fakgrupo estas grupo de Esperantistoj kun komuna intereso aŭ ŝatokupo.  Ni sekvas la celojn deklaritajn en niaj statutoj por subteni la Esperantan komunumon en Usono. Per fakgrupoj ni povas helpi en la "disvastigo de informoj pri la internacia helplingvo Esperanto en Usono".

Legu plu pri fakgrupoj en *Usona Esperantisto*:
https://bulteno.esperanto-usa.org/a/2021/06/dlp/

## La Nomuma Komitato:

La komitato por trovi taŭgajn kandidatojn por la estraro, la nomuma (aŭ kandidatiga) komitato denove sukcesis sub la gvido de sia ĉefo, Rafael Nogueras.  Dankon, Rafa!  Ni anoncos la rezulton de la balotoj ĝis nia solena fermo de 2022 landa kongreso de Esperanto-USA.  Ni ankaŭ tiam anoncos la kandidatigan komitaton por la venonta jaro.

Por Sekretario,

1. Charlotte Burton

Por Direktoro:

1. Fred Meyer III (f3meyer@gmail.com)
2. Ruth Kevess-Cohen (ruth3209@gmail.com)
3. Enrique Haro Márquez (enrique.haro.marquez@gmail.com)
4. Vince Allison (vinceallison@gmail.com)
5. Matt Brooks (mattjbrooks@gmail.com)
6.

La membroj de la nomuma komitato estis Jorge Rafael Nogueras (estro), Amanda Higley, Bobby Brooks, Marcus Griep, kaj Brandon Sowers.  Dankon al ĉiuj en la komitato.
La estraranoj, kiuj finas sian deĵoron ĉijare estas Charlotte Burton (direktoro kaj sekretario de la estraro), Fred Meyer (direktoro), kaj Brian Harmon (direktoro).  Dankon al Charlotte, Fred, kaj Brian por servi kiel estraranoj.

## La Teknologia Teamo

Tim Boronczyk gvidas la teknologian teamon. Ĉi tiu teamo de fakuloj helpas la estraron kaj komitatojn pri teknologiaj aferoj, por ke aliaj volontuloj ne devu esti tiom spertaj por fari sian laboron. Ĉi tiu komitato ankaŭ helpas nian retejestron laŭbezone.

## La Eldona Komitato

Hoss Firooznia gvidas la Eldonkomisionon, kiu aktivas en eldonado kaj konservado de verkoj kiuj meritas atenton. Unu projekto estas eldoni la libron de Sylvan Zaft, The Secret Language of Peter Jameson.

## La retejo, bulteno, kaj retbutiko

La retejon prizorgas Hoss Firooznia kaj liaj helpantoj. La Retbutikon pritraktas la direktoro de nia Centra Oficejo Vilĉjo Harris. Legu plu pri tiuj servoj en iliaj raportoj.

Ni vokas atenton al la grandega arkivo en nia retejo. Hoss Firooznia laboris multe por provizi al vi la grandan kolekton de ĉiuj bultenoj el Usono por kaj Esperanto-USA (ELNA / Esperanto-Ligo por Norda Ameriko) kaj EANA (Esperanto-Asocio de Norda Ameriko). Rigardu la nunan liston por la jaroj 1906 ĝis 2022! Legu pri la historio, defioj, kunlaboro, kaj progreso de la movado en Usono tra la jaroj!

## Komitato pri Rimedoj

Ĉi tiu komitato zorgas pri la akiro de mono por daŭra stabileco de Esperanto-USA. Malgraŭ tio, ke ni gajnis pli ol tri mil dolarojn en 2021, ni ne povas subteni nin per nur membrokotizoj. Ni bezonas aliajn projektojn kaj kampanjojn por akiri monon. Tion faras la estraro kaj la Komitato pri Rimedoj. Ni uzos la servon "Salesforce" danke al Brandon Sowers kaj aliaj kiu nun organizas la grupon por uzi tiun softvaron sperte.

## La Terpeco en Teksaso

Antaux multaj jaroj, iu bonkorulo donacis du terpecojn en okcidenta teksaso al ELNA (nun konata publike kiel Esperanto-USA). Jam multajn jarojn ni pagis la imposton por tiuj senvaloraj terpecoj. Tiuj ter-havaĵoj estis sen aliroj, sen stratoj, sen akva-servo, kaj sen elektro en la mezo de la vaka tereno de okcidenta Teksaso.

La plej granda problemo estis, ke tiu temo okupis la kunsidojn de la estraro tra la jaroj. Finfine, danke al cxi tiu estraro kaj la direktoro de nia centra oficejo, ni sukcesis vendi tiujn terpecojn kontraux tri mil dolaroj. Dankon al Vilĉjo kaj la persista kunlaboro de la estraranoj! Tiuj terpecoj ne plu okupos tempon en niaj estraraj kunsidoj.

## Kvin-Jara Plano

Ni faros nian mapon por la estonteco, kiu inkluzivas la novan komitaton pri edukado, pli da fakgrupoj, pli fortan rilaton kun UEA per niaj delegitoj, kaj pli fortan rilatojn kun AAIE, ILEI, TEJO, kaj USEJ.  Nia nuno kaj estonteco estas brilaj pro alia Usona Bona Filmfestivalo kaj aliaj sukcesaj projektoj.
Tiun planon faros la nova estraro de Esperanto-USA kiu komencos al deĵorperiodojn post nia solena fermo en Montrealo.

## Strategia planado

1. Post la nia Landa Kongreso de 2022, kiu okazas dum la UK en Montrealo, la nova estraro faros kvin-jara planon.
2. Ni profitos de la kunlaboro de junuloj, kiuj eniras la movadon en Usono.
3. Ni kunlaboros en la Strategia Planado de UEA, kiu okazas ĉe https://forumo.uea.org/forumo/70-strategia-laborplano, kaj kunlaboros kun la estraro de UEA.
4. Ni fortigos la komitatojn kaj lokajn grupojn per la pli forta komunika infrastrukturo.
5. La komitatoj pri rimedoj, membreco, kaj diskonigo planos kaj lanĉos siajn kampanjojn.

Amike, filipo

Phil Dorcas, prezidanto,
Esperanto-USA (ELNA, la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko)

# Raporto pri la  Centra Oficejo de Esperanto-USA

La Centra Oficejo funkcias normale. Centoj de  libroj ankoraŭ estas haveblaj en la reta libroservo, kaj membroj ankoraŭ ricevas 15% rabatojn kontraŭ la prezoj.

La C.O.  respondas al demandoj kiuj venas telefone, perpoŝte, retmesaĝe, kaj per la formularo en la retejo.  Kiam venas peto por informo de iu, kiu interesiĝas pri Esperanto aŭ pri la plej proksima loka grupoj, la C.O. plenumas la peton kaj ankaŭ plusendas la informon de la informpetinto al la plej proksima loka grupo kaj al la regiona kunordiganto de tiu grupo.  Tiu system por la inforpetintoj funkcias bone, kaj kelkaj lokaj grupoj nun havas novajn membrojn pro tiu sistemo.

La C.O. helpas la kasiston prepari financan informon, kaj eldonas ĝin en ĉi tiu jarraporto.

La C.O. prizorgas la ĉiujara voĉdonado de Esperanto-USA, kaj raportas la rezultojn al la prezidanto.

Raportas Vilĉjo Harris, Direktoro de la Centra Oficejo, en la ŝtato Maino.

# Raporto pri la 52-a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) 2021

Por la dua fojo, NASK estis tute per la interreto. La partoprenantoj uzis la sistemon "Zoom" kiu ebligas vivan, realtempan interagon kun instruisto kaj la studantoj. Estis 3 niveloj de instruado dum la monatoj de julio kaj frua aŭgusto. La instruteamo estis: Tim Owen de la Esperanto-Asocio de Britio en la supera kurso (Dokumentaj distraĵoj,devojiĝo kaj diversaĵoj: vagado tra Esperanto per paperaĵoj), Christophe Chazarein-Bréa el Francujo en la meznivela kurso ( Trans la Sojlon de la Lingvo), kaj Hans Becklin el Usono en la post-komencanta nivelo (Ni Saltu en Esperanton). Entute 60 studantoj partoprenis.

Alia kurso okazis en la printempo de 2021. Christophe Chazarein-Bréa instruis "Kiam Pentrarto Renkoniĝas kun Esperanto." 15 studantoj ricevis 16 horojn da instruado dum la kvar semajnfinoj en marto.

La Fonduso "Schulze Education Endowment" de la Esperantic Studies Foundation (ESF) finance subtenis la tutajn programojn, kaj efektive ĉiu partoprenanto ricevis iom da subvencia helpo. Malmultaj el la kursanoj petis pluan subvencian helpon el la NASKE-Fonduso de Esperanto-USA pro la malalta prezo de nur $79. La NASKE-Fonduso de Esperanto-USA estas longdaŭra fonduso kreita por helpi Esperanto-lernantojn studi ĉe NASK.

La NASKa teamo multe laboris por sukcesigi la nekutiman programaron. Nuntempe en tiu teamo aktivas: Lee Miller (Teksaso), Derek Roth (Nova Meksiko), Chuck Mays (Norda Karolino) kaj Hoss Firooznia (Novjorko). En 2022 ni revenos al William Peace University por pli mallonga, pli malgranda ĉeesta kursaro.

.

Ellen M. Eddy
Administranto NASK
La 27an de junio 2022

## Raporto pri la Senpaga Perpoŝta Lecionaro 2021

Inter 1 januaro kaj 31 decembro 2021, 31 novaj studantoj komencis la lecionaron (25 en 2020). El tio 2 estas en malliberejoj (3 en 2020). Tiujn nomojn mi sendis al la C.O. por aldono al la listo de informpetantoj. Dum la sama periodo 4 ricevis diplomojn (3 en 2021). 1 estis en malliberejoj (2 en 2020).

Ellen M. Eddy, Administranto

## Raporto pri la Diskoniga Komitato 2021

La fokuso de la Diskoniga Komitato estas krei pozitivan unuan impreson pri Esperanto kaj krei pozitivan medion por lerni pri Esperanto por tiuj, kiuj decidas lerni gxin, kaj ankaux kuragxigi ilin eniri la Esperanto-komunumon, precipe E-USA.

Niaj realigoj:
- Ni invitis kaj arangxis ke membroj el E-USA cxeestis Poliglotajn Renkontigxojn 17 fojojn, komence en januaro 2022:
- Ankaux, ni sugestis al Hoss Firooznia (E-USA) la reeldonon de la libro "La Sekreta Lingvo de Peter Jameson" por ke gxi povu esti enmetota en Malgrandajn Senpagajn Bibliotekojn.
- Ni penis kontakti (sendis remesagxojn kaj telefonis) cxiuj de la kontaktuloj de la lokaj kluboj en la retpagxara listo de E-USA <https://ttt.esperanto-usa.org/groups/en> kaj sendis la rezultojn al Fred Meyer por, ke la informo povu esti gxisdatigota.
- Chuck Mays, nome de la Diskoniga Komitato, skribis artikolojn kun ideoj propogandi Esperanton por la novajxletero "La Usona Esperantisto."

Niaj venontaj projektoj:
- Cxe sciencfikciaj kongresoj, komence kun Loscon la 25-a gxis la 27-a de novembro <https://loscon.org/48/>. Ni preparas aficxo por la sciencfikcia kongreso, kion ni sendos al la Estraro de E-USA en aparta retposxto por aprobo.
- Ni planas starigi cxeeston cxe sxako-rilataj agadoj, kaj cxe eventoj de radio-amatoroj.

Amike,

Will Morton
Cxefo de la E-USA Diskoniga Komitato

## Raporto pri la Usona Bona Film-Festivalo

En decembro de 2020, la estraro de Esperanto-USA petis subvencion de $500 de la fondaĵo Esperantic Studies Foundation por okazigi konkurson pri mallongaj filmoj en

Esperanto. ESF tiam ne konsentis subteni la konkurson do la estraro mem decidis okazigi kaj subteni la aferon sole. En marto de 2021, ili lanĉis la Usonan Bonan Film-Festivalon kaj spezis nur $1050 kontraŭ 11 kontantaj premioj por la filmfarantoj. Esperanto-USA ricevis 26 filmojn en Esperanto el kelkaj landoj kaj la filmoj nun estas spekteblaj en nia oficiala Jutuba kanalo. La estraro faris duan film-festivalon en 2021 kaj ricevis 20 aldonajn filmojn. Kompare multekostan vojaĝon al kongreso, partopreno en la film-festivalo estis tute senkosta kaj la rezultoj (la faritaj filmoj) estas kaj restos ĝueblaj senkoste por ĉiuj, kiuj uzas la interreton. En 2022, ESF konsentis subteni la festivalon kaj la estraro tiam duobligis la grandon de la premioj.

## Raporto pri la Fonduso Goldman

La Fonduso Goldman estas nerestriktita fonduso. Tio signifas, ke la estraro de E-USA rajtas uzi ĝin se necesas. Charlotte BURTON nun estras ĝin. Tio signifas, ke ŝi mem devas aprobi ĉiujn elspezojn el tiu fonduso. La fonduso Goldman estas la loko, kien la estraro de Esperanto-USA metis viajn donacojn por la monpeta kampajno “Esperanto in the USA,” por peti monon por pli da projektoj, ktp. Tial, dum 2021, tiu ĉi fonduso elpagis la premiojn por la nova “Usona Bona Film-Festivalo.” Oni povas lerni pli pri tio en sia propra raporto kaj ĉe nia JuTuba-kanalo. Jam pro ĝi, ni ricevis dum 2021 46 novajn filmetojn en Esperanto. Jam Esperanto film-kulturo elvenas el la festivalo, kaj ni ricevas filmetojn el ĉirkaŭ la tuta mondo. Pro viaj donacoj al tiu ĉi fonduso, Usono kaj Esperanto-USA estas ĉe la fronto de la Esperanto filmkulturo. Ni kore dankas vin kaj invitas vin spekti la fruktojn de viaj donacoj.

## FINANCAJ DOKUMENTOJ

# Esperanto-USA
## Statement of Activities
## Calendar year 2021 and Comparative 2020

| | Total 2020 | Unrestricted 2021 | Restricted 2021 | Int Only 2021 | Total 2021 |
|---|---|---|---|---|---|
| Contributions (Note 1) | $42,858 | $33,251 | $7,070 | $155 | $40,475 |
| Annual Dues | 14,170 | 14,625 | | | 14,625 |
| Net Catalog and Subscription Sales (Note 2) | 570 | 449 | | | 449 |
| Net UEA Membership/Services | (85) | 446 | | | 446 |
| Net Convention Income | (76) | - | | | - |
| Net Investment Income | 16,086 | (2,819) | (6,702) | - | (9,521) |
| Net Correspondence Course Income | - | - | | | - |
| Misc. Income | - | 4 | | | 4 |
| **Total revenues, gains, and other support** | **$73,522** | **$45,955** | **$367** | **$155** | **$46,478** |
| Esperanto Courses & Educ. Expenses (Note 3) | $3,339 | $- | $2,916 | | $2,916 |
| Educational Video Expenses | 500 | - | - | | - |
| Publication and Publishing Expenses | 1,712 | 3,523 | | | 3,523 |
| Expenses of Promoting Esperanto (Note 4) | 3,260 | 152 | 2,857 | | 3,008 |
| Membership Maintenance Expenses | 1,645 | 2,147 | | | 2,147 |
| Management and General Expenses(Unallocated) | | | | | |
| Salaries & Related (Note 5) | 31,630 | 31,039 | | | 31,039 |
| Rent & Utilities (Note 6) | 3,650 | 2,271 | | | 2,271 |
| Office and Misc. (Note 7) | 3,294 | 3,665 | | | 3,665 |
| **Total expenses** | **$49,032** | **$42,797** | **$5,773** | **$-** | **$48,570** |
| **Net Gain/(Loss)** | **$24,491** | **$3,158** | **($5,405)** | **$155** | **($2,092)** |
| YTD Equity at the beginning of the year | | $78,102 | $104,313 | $194,196 | $376,611 |
| Adjustments (Note 8): | | (168) | 1,292 | - | $1,125 |
| This year's total gains and losses | | 3,158 | (5,405) | 155 | (2,092) |
| **Total Equity YTD** | | **$81,092** | **$100,200** | **$194,351** | **$375,644** |

1 - Includes all fund contributions, plus Friends of Esperanto Dues, less new Life Memberships, plus in-kind donations
2 - Includes sales and related expenses of all physical wares, UEA memberships, and magazines
3 - Includes NASKE Expenses, CATW Expenses, Schulze Expenses, and Goldman Expenses
4 - Includes Expenses of Wolff Fund, Harlow Fund, Glenny Fund, and Marketing Expenses
5 - Includes Salaries, Payroll Taxes
6 - Includes Rent, Utilities, Telephone/Fax, Internet Access, Office Insurance
7 - Includes Payroll Fees, Office Postage and Expenses,Small Equipment Purchases
Licenses/Permits/Taxes, Bank Charges, Liability Insurance and Miscellaneous Expenses
8 – corrections to various accounts

# Esperanto-USA
## Statement of Financial Position
## As of Year End 2021

| | Dec 31, 2020 | Dec 31, 2021 |
|---|---|---|
| **ASSETS** | | |
| **Current Assets** | | |
| **Cash/Checking/Savings** | | |
| **11100 · Petty Cash** | $100 | $100 |
| **11300 · Undeposited Funds** | 262 | 5,772 |
| **11400 · Checking, Comm Bank** | 25,353 | 25,586 |
| **11450 · Money Market, Comm Bank** | - | - |
| **11460 · PayPal** | 4,309 | 4,534 |
| **Total Cash/Checking/Savings** | $30,025 | $35,992 |
| **Other Current Assets** | | |
| **11475 · UEA konto** | $(1,380.36) | $(649) |
| **11500 · Credit Card Payments** | - | - |
| **12200 · Accounts Receivable** | (244) | 711 |
| **Total Other Current Assets** | $(1,624) | $62 |
| **Other Assets** | | |
| **11600 · Investments** | $383,554 | $374,033 |
| **11800 · Land, El Paso** | 1,121 | - |
| **12400 · Book Service Inventory** | 10,857 | 9,691 |
| **12500 · Prepaid Expenses** | 749 | 784 |
| **11900 ·Items Donated** | 4,662 | 4,662 |
| **Total Other Assets** | $400,944 | $389,170 |
| **TOTAL ASSETS** | **$429,344** | **$425,224** |

| | Dec 31, 2020 | Dec 31, 2021 |
|---|---|---|
| **LIABILITIES & EQUITY** | | |
| **Liabilities** | | |
| **Current Liabilities** | | |
| **21100 · Accounts Payable** | $284 | $284 |
| **21400 · Sales Tax Payable** | - | - |
| **21700 · A/P Subscriptions** | - | - |
| **21800 · A/P UEA** | - | - |
| **22599 · Outstanding Payables** | 1,064 | 967 |
| **22500 · Gift Certificate Payable** | 245 | 235 |
| **22650 · Deferred Income** | 15,344 | 14,344 |
| **22900 · E-USA kontoj** | 6,986 | 6,212 |
| **Total Current Liabilities** | $23,924 | $22,043 |
| **Long-Term Liabilities** | | |
| **22700 · Life Memb.** | $28,809 | $27,536 |
| **Total Long-Term Liabilities** | $28,809 | $27,536 |
| **Total Liabilities** | **$52,733** | **$49,579** |
| **Equity** | | |
| **39100 · Unrestricted Net Assets** | $78,102 | $81,093 |
| **39200 · Temporarily Restricted** | 104,313 | 100,200 |
| **39300 · Permanently Restricted** | 194,196 | 194,351 |
| **Total Equity** | **$376,611** | **$375,644** |
| **TOTAL LIABILITIES & EQUITY** | **$429,344** | **$425,224** |

# 2021 Quarterly Stmts of Fund Activity_Annual.xls

| | Beginning Balance | Donations Received | Expenses | Transfers | Balance Before Inv.Inc. | Investment Income | Adjusted Ending Balance |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **Unrestricted Funds** | | | | | | | |
| * General | $(53,016.52) | $33,250.70 | $35,202.52 | $2,072.61 | $(52,895.73) | $(2,819.30) | $(55,715.03) |
| * Gibson Endowment | 28,400.27 | 110.00 | - | - | 28,510.27 | - | 28,510.27 |
| * H.E. Reed Education | - | - | - | - | - | - | - |
| * Life Membership | 49,722.74 | 800.00 | - | (2,072.61) | 48,450.13 | - | 48,450.13 |
| * Glenny | 3,808.95 | 60.00 | - | - | 3,868.95 | - | 3,868.95 |
| * Unrestricted Publishing | 18,424.80 | - | - | - | 18,424.80 | - | 18,424.80 |
| Goldman Education | 39,415.42 | 1,465.00 | 2,098.98 | - | 38,781.44 | (1,433.06) | 37,348.38 |
| **Total Unrestricted** | **$86,755.66** | **$35,685.70** | **$37,301.50** | **$-** | **$85,139.86** | **$(4,252.36)** | **$80,887.50** |
| **Restricted Funds** | | | | - | | | |
| Restricted Publishing | $6,051.04 | $1,024.52 | $817.00 | $- | $6,258.56 | $(895.40) | $5,363.16 |
| NASKE | 20,050.22 | 3,275.00 | - | - | 23,325.22 | (691.90) | 22,633.32 |
| Educational Video | 7,070.15 | - | - | - | 7,070.15 | (175.51) | 6,894.64 |
| Schulze Education | 53,292.42 | - | - | - | 53,292.42 | (2,774.41) | 50,518.01 |
| CATW Education | 3,197.49 | 25.00 | - | - | 3,222.49 | (224.78) | 2,997.71 |
| Wolff Publicity | 3,980.20 | - | - | - | 3,980.20 | (282.07) | 3,698.13 |
| Don Harlow Literatura | 2,094.79 | - | - | - | 2,094.79 | (52.00) | 2,042.79 |
| 777 Fund | 987.34 | 735.00 | 2,856.72 | - | (1,134.38) | (25.13) | (1,159.51) |
| Amikeco Translimen | 920.69 | 50.00 | - | - | 970.69 | (24.10) | 946.59 |
| Festoj | 4,957.83 | 25.00 | - | - | 4,982.83 | (123.69) | 4,859.14 |
| **Total Temp. Restr.** | **$102,602.17** | **$5,134.52** | **$3,673.72** | **$-** | **$104,062.97** | **$(5,268.98)** | **$98,793.99** |
| **Interest-Only (Permanently Restricted) Funds** | | | | - | | | |
| Massey | $70,805.34 | $- | $- | $- | 70,805.34 | $- | $70,805.34 |
| Thomas A Goldman | 17,133.00 | - | - | - | 17,133.00 | - | 17,133.00 |
| Ellen Lewis | 4,655.01 | - | - | - | 4,655.01 | - | 4,655.01 |
| Catherine & William Schulze | 58,445.83 | 25.00 | - | - | 58,470.83 | - | 58,470.83 |
| Wolff Endowment | 7,324.72 | 120.00 | - | - | 7,444.72 | - | 7,444.72 |
| Children Around the World | 5,832.52 | - | - | - | 5,832.52 | - | 5,832.52 |
| Publishing Endowment | 30,000.00 | 10.00 | - | - | 30,010.00 | - | 30,010.00 |
| **Total Perm. Restr.** | **$194,196.42** | **$155.00** | **$-** | **$-** | **$194,351.42** | **$-** | **$194,351.42** |
| **Total of all Funds** | **$383,554.25** | **$40,975.22** | **$40,975.22** | **$-** | **$383,554.25** | **$(9,521.34)** | **$374,032.91** |

**NOTES:**

General Fund Donations reflect contributions to General Fund and Friends of Esperanto Dues

General Fund Expenses reflect adjustment to balance receipts and expenditures

Life Membership Transfers reflect annual amortization of Life Memberships at 7% to Annual Dues

Restricted Publishing transfers reflect allocation of 50% of E-USA published gain

| **Net Investment Income Includes:** | |
|---|---|
| **Interest/Dividend Income** | **$6,751.49** |
| **Gains(Losses) Realized** | **$-** |
| **Unrealized Gains (Losses)** | **$(16,177.83)** |
| **Exspenses:Svc Chgs** | **$(95.00)** |
| **Net Investment Income** | **$(9,521.34)** |